

Bulgara **ESPERANTISTO**





Aktivuloj de E-societo „Fajrero“ (Dospat).
Dekstre la kvara estas la prezidanto
Emil Ĉirpanki (vd. paĝon 7,



La ĥoro de E-societo „Fajrero“ en
Varno (vd. paĝon 5)

ENHAVO

* * *	La infanoj — nia estonteco . . .	1
K. Vălev.	K-do Violin Oljanov jubileas (intervjuo) . . .	2
V. Mitovski.	Jubilea renkontiĝo en Trojan	5
Evtim Anĉev.	Ekspozicio de pentristo-esperantisto . . .	5
Lazar Andreev.	Nova esperantista ĥoro .	5
Elena Stojkova.	La esperantistoj de Burgas manifestacias . . .	5
Ivan Draganov.	Celebro de veterano (Stefan Minkov) . . .	6
Dimitro Denĉev.	Laŭ la paŝoj de aprilanoj . . .	6
Emin Ĉirpanski.	Esperanto-balo en Dospat . . .	7
Ĉeestinto.	Celebro de Kiril kaj Metodij	7
Ilka Nikolova.	En Pazarĝik bolas vigla esperantista agado . . .	7
Vladimir Jelev.	Konstanta propaganda E-vitrino en Plovdiv . . .	7
Detev Blanke.	Kiel preleganto en Bulgario . . .	8
	Fonda Konferenco de ASE . . .	9
* * *	El la raporto de prof. d-ro Mahomet Isajev . . .	9
Aleksandro Ĥarkovskij.	Mi aplaudas al la kreiĝo d. esperantista asocio . . .	10
Vasil Borovanski.	La spertoj de la Centra Stacio de Junaj Teknikistoj — kontribuo por feliĉa nuntempo kaj estonto de la infanoj . . .	14
Ljuba Bojaĝieva.	La malgranda esperantisto . . .	16
Ljudmila Paspaleeva.	Miaj neforgeseblaj amiketoj . . .	16
* * *	Deziras kor spondi . . .	IV

Redakta Komitato:

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JANKOVA, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Venelin MITEV, Flori NIKOLOV.

Sekretario-administranto: **Metodi Garev**
Korektinto: **Rajna Konstantinova**

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ NASKITAJ EN JUNIO

La popola demokratio estas ebla nur ĉe gvida rolo de la laborista klaso.

La neniofarado estas krimo, kiun oni devas plej severe puni — morale, politike, kriminale.

La plej potenca faktoro de ĉiu progreso, de ĉiu antaŭeniro — tio estas la kritiko kaj la memkritiko.

La amo estas granda faktoro en la vivo de la homoj. Ĝi donas flugilojn. Sed estas necesa fidinda moralo, ne hipokrita, protestantisma, sed efektiva, komunisma moralo.

En la sfero de la kulturo laŭ kapabloj ne estas malgrandaj kaj grandaj popoloj. Ne ekzistas valoraj kaj nevaloraj popoloj. Ĉiu popolo, kiom ajn malgranda, povas esti kapabla enporti en la komunan trezorejon de la kulturo sian kontribuon de valorajoj.

Georgi Dimitrov

(18. 6. 1882—2. 7. 1949)

Rajton esti memfida kaj fiera pri sia estonteco havas tiu junulo, kiu ĉiutage aldonas ion gravan al sia morala kaj intelekta perfektigo.

La simplajn verojn oni plej ofte malfacile komprenas.

Kiril Ĥristov, poeto

(25. 6. 1875—2. 9. 1962)

Elektis kaj tradukis: **Stojan Kostadinov**



LA INFANOJ — NIA ESTONTECO

Plenumiĝis dudek jaroj de kiam la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UNO) akceptis la Deklaracion pri la Rajtoj de la Infanoj. Por honori tiun gravan eventon UNO pasintjare prenis rezolucion proklami la 1979an jaron kiel Jaron de la Infano. Apenaŭ alia evento povus unuiĝi tiel forte ĉiujn homojn de nia planedo ol la problemo pri la infano, pri ĝiaj sanktaj rajtoj. Unuiĝis ilin en la sentoj, en la pensoj, en la agoj, dediĉitaj al la bono kaj feliĉo de la infanoj — tiuj plej delikataj floroj de la vivo.

Ĉu estas en la mondo io pli kara ol la infanoj? Ja por ili ĉiu estas preta ĵeti sin en la fajron, ekstari kontraŭ mortdanĝero. La infanoj estas simboloj de la estonto. La zorgoj pri ili estas zorgoj pri la morgaŭa tago. La infanoj estas nia ĝojo, nia fiero kaj konsolo. Pere de ili ni vidas nin mem en la estonteco, ni esperas triumfon de niaj ideoj, de niaj revoj pri vivo pli bela, pli feliĉa ol la hodiaŭa.

Dum la Jaro de la Infano ĉiuj ŝtatoj kaj registaroj, ĉiuj organoj kaj organizaĵoj, la tuta monda socio estas alvokitaj fari revuon de la zorgoj, ktujn oni donas al la infanoj kaj efektiviĝi novajn iniciatojn por kontentigi ties kreskantajn bezonojn, sekurigi por ili vivon en ĝojo, feliĉo kaj paco.

La alvoko de UNO, tiu plej elstara forumo de la homaro, rilatas plene ankaŭ al la monda E-movado, do ankaŭ al unu el ĝiaj plej fortaj taĉmentoj — la bulgara E-movado. La E-movado, nedisigeble ligita kun la batalo por paco kaj internacia kompreniĝo, vidas en la infanoj la morgaŭajn batalantojn por tiuj sanktaj ideoj pere de la internacia lingvo Esperanto.

Dum la Jaro de la Infano Popola Respubliko Bulgario ankoraŭ pli forte substrekas la grandegajn avantaĝojn de la socialisma sociordo, kiu plej certe sekurigas pacon kaj feliĉon por ĉiuj infanoj. Tial ne hazarde en tiu ĉi jaro en Bulgario okazos ankaŭ la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“, kiu efektiviĝos sub la alta protekto de la prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario k-do Todor Ĵivkov kaj la ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M'Bow. Tiu ĉi asembleo estos nova kontribuo al la proksimiĝo de la popoloj pere de proksimiĝo de ties infanoj.

Socialisma Bulgario estas ekzemplo pri la zorgoj, kiujn la socio donas al la patrino kaj la infano. Pri ili zorgas 2765 infanaj kaj virinaj konsultejoj, 150 infanaj hospitaloj kun 8500 litoj, 1018 infanvartejoj kun 72 000 lokoj, 1048 pediatraj administrejoj, granda nombro de naskiĝdomoj, infanaj sanatorioj ktp. Por ili laboras 2500 pediatroj, 1500 akuŝistinoj, pli ol 1100 aliaj specialisioj. Nun 100% de la naskiĝoj en Bulgario okazas en naskiĝdomoj. Kia difirencio kompare kun kapitalisma Bulgario, kie ekzistis tute malgranda nombro

de infanaj saninstitucioj: 4 infanaj hospitaloj kun 220 litoj, 3 infanvartejoj, nur kelkaj naskiĝdomoj kaj eta nombro de infankonsultejoj por la tuta lando. Ne mirinde, ke tiam (1936 j.) 146 el 10000 vivnaskitoj mortis dum la unua jaro. Nun la mortonombro de infanoj en Bulgario estas ege malaltigita — 23,7 el 10000. Tio estas rimarkinda atingo kaj ĝi vicigas Bulgarton antaŭ tiaj evoluintaj kapitalismaj landoj kiel Usono, Britio ka.

Bulgario fieras pri sia medicina-sociala sistemo, kiu protektas la gravedan virinon kaj la patrinon, certigas libertempon pro gravedeco kaj nasko en plej favoraj por Eŭropo dimensioj, materialajn stimulojn por naskado, akcelitan evoluon de la infanaj socialaj stabloj (vartejoj kaj ĝardenoj), la produktadon de pretaj infannutraĵoj, senpagan medicinan priservadon kaj medikamentojn, senpagan instruadon en ĉiuj gradoj de lernejoj ktp. Ekzemple dum 1978 j. 80% el ĉiuj infanoj inter 3—7 jaraĝo estis en infanestabloj sub la zorgoj de medicinistoj kaj edukistoj.

Tio tute ne estas hazarda. La zorgoj pri la infanoj en PR Bulgario estas proklamitaj kiel unuaranga tasko de la tuta socialisma socio. Tio estas enskribita ankaŭ en la baza leĝo de la Respubliko — la Konstitucio. Ĝi estas enskribita ankaŭ en la Programo de la Bulgara Komunista Partio, kiu diras: „La kreskigo, edukado kaj instruado de la juna generacio estas unuaranga zorgo de la socio pri ĝia plej valora kapitalo, pri ĝia estonto kaj espero...“

La althumanaj celoj kaj taskoj, enskribitaj en la Deklaracio pri la Rajtoj de la Infanoj, en la Konstitucio de PR Bulgarto kaj en la Programo de BKP inspiras la bulgarajn e-istojn al noblaj faroj, samkiel ĉiujn bulgarojn, al kiuj estas karaj la paco, la internacia amikeco, interkompreniĝo kaj popola feliĉo.

K-DO VIOLIN OLJANOV JUBILEAS

Nia k-do Violin Oljanov surprizis nin: li farigis 60-jara! Lige kun tio ni starigis al li kelkajn demandojn. Jen la respondoj, kiujn li afable donis.

Demando. Ni opinias, ke estus interese por niaj legantoj ekscii, kiam vi estiĝis esperantisto, kaj kio vin instigis al tio?

Respondo. Jam kiam mi estis malgranda lernanto, mi emis al socia vivo. Mi estis ekzemple en la estraro de la turista societo, partoprenis en orkestro de popolaj instrumentoj, aktive membris en gimnastika societo. En la unua klaso de la gimnazio (la oka klaso laŭ la nuna lerneja sistemo) mi ekinteresiĝis pri la stenografio kaj, ĉar ni en la klasika fako ne lernis ĝin, mi aliĝis al fakultativa kurso. Malnova vero: ĉio bonvola estas pli fervore asimilata. Mi estiĝis unu el la elstaraj stenografoj de la gimnazio kaj la sekvan jaron oni elektis min estrarano de la stenografa societo. Mi estis estrarano ankaŭ de la societo de Ruĝa Kruco.

Speciale interesis min lingvoj. En la regula programo mi lernis la francan kaj


fakultative la germanan. Kaj kiam en la printempo de 1933 en nia urbo ekgvidis kurson de la Internacia Lingvo la konata e-isto P. G. Pamporov, mi entuziasme aliĝis, kvankam la severa reĝimo en la knaba gimnazio de Varno ne permesis al lernantoj partopreni en similaj vesperaj arangoj, des pli e-istaj. La kurso ne atingis sian finon, ni pasis nur dek lecionojn, sed la starto okazis, kaj nenia forto plu povis min haltigi: ankoraŭ pli fervore mi daŭrigis la lernadon de E-o aŭtodidakte.

Neantaŭvidita evento influis treege favore al mia plua elkresko kiel E-aganto. En 1935 oni min forigis el la gimnazio pro kontraŭfaŝista agado „por ĉiam el ĉiuj lernejoj de la reĝlando“. Tion, kompreneble, mi eksentis kiel pezan frapon sur min, tamen objekte ĝi ludis pozitivan rolon en mia ĝenerala intelekta kaj socia disvolviĝo kaj precipe pri mia elkresko kiel E-aganto.



D. *En kiu sfero de E-aktivecoj vi plej multe laboris ?*

R. En la unua periodo de mia esperantisteco mi okupiĝis antaŭ ĉio pri organiza laboro. Kompreneble, en la komenco mem dominis la helpa laboro. Bibliotekisto en la



urba biblioteko estis la veterano de la E-movado Georgi Sapunĝiev. Mi tre ofte vizitis la bibliotekon, ĉar tie estis E-fako (en kiom da sociaj bibliotekoj ekzistas nun E-fakoj?), kaj mi avide legis E-librojn. Do, Sapunĝiev utiligis mian junulan fervoron kaj ofte komisiis al mi konkretajn servojn: forporti al iu estrarano ian materialon, skribi invitilojn, sciigi pri kunveno. Ĉion en la societo faris ni, la membroj mem: ni disgluis afiŝojn kaj propagandilojn, purigis la klubojn, helpis la kursgvidantojn ktp. Iom post iom mi enteniĝis en la vere organizan laboron: aranĝon de amuzvesperoj, efektivigon de amasaj ekskursoj, konsistigon de varia programo de la kunvenoj, renkonton de eksterlandaj gastoj, kunlaboron kun ceteraj amasorganizaĵoj, precipe la kulturaj societoj („legejoj“) kaj la abstinuloj.

Post la liberiĝo el la faŝismo en 1944 mi estiĝis la unua prezidanto de E-societo „Albatroso“ en Varno, poste en Sofio ekde 1955 mi estiĝis estrarano de BEA kaj sinsekve okupis la postenojn de ĝenerala sekretario kaj vicprezidanto de la Asocio. Mi estis ankaŭ ĝenerala sekretario de LKK de la du universalaj kongresoj, okazintaj en Bulgario (Sofio — 1963 kaj Varno — 1978).

Mi jam en la frua esperantisteco vizitadis ĉiujn kursojn kaj atente perceptis la meto-

dojn de diversaj kursgvidantoj. Jam en tiu periodo (1936) mi komencis instrui progresintojn. La kursoj por komencantoj devis esti registrataj ĉe la polico, kaj ĝi ne permesus al mi, kiel antifaŝisto, gvidi tian kurson. Pro tio mi okupiĝis nur pri progresintoj. Tiuj kursoj estis interne-societaj, ni ne anoncis ilin publike kaj tiel ni evitis la enmiksiĝon de la polico.

En la lastaj jaroj mi regule gvidas ĉiagradajn kursojn de E-o kaj tiu ĉi aktiveco kvazaŭ elpuŝis ĉe mi la emon al organiza laboro. Kiel sciante, la akirita sperto en la gviditaj de mi ĝis nun ĉirkaŭ 45 kursoj permesis al mi verki lernolibrojn por unua, dua kaj tria gradoj, gramatikon, artikolojn pri metodikaj demandoj k.a.

Mia aparte ŝatata aktiveco dum mia preskaŭ duonjarcenta E-vivo estis la literatura kaj ĵurnalista laboro. Ĝi liveris al mi grandan plezuron. Mi memoras kun kia malpacienco mi atendis vidi presitaj miajn verkojn. Unu el la unuaj miaj ĵurnalistaj provoj estis korespondaĵo, publikita en la junulara antifaŝista ĵurnalo „Ĵar“ en 1936 pri la unua kurso de Georgi Dimov. Poste mi jam regule partoprenis en la E-paĝo de la ĉiutaga ĵurnalo „Zarja“, en aliaj bulgarlingvaj gazetoj kaj, kompreneble, en la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, kie aperis en 1937 miaj unuaj versaĵoj. Kiel studento en Sofio mi redaktis kelkan tempon la E-paĝon de „Zarja“, komence kun Ivan Keremidĉiev kaj post ties mobilizo — mi sola. Sep jarojn mi estis ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, de antaŭ tri jaroj — de „Paco“. Mi redaktis plurajn bultenojn, librojn, tradukojn. . .

En la lastaj dudek jaroj mi „enŝoviĝis“ en esperantologiajn esplorojn. Fruktado de miaj observoj estas pluraj prilingvaj artikoloj, pri la E-fonetiko, pri la problemoj de la traduko, pri la E-gramatiko. Ja mi eldonis lastjare kompletan gramatikon. Per ĝi mi celis ne nur prezenti al niaj e-istoj en populara formo la regulojn de la E-gramatiko, sed ankaŭ originalajn observojn pri iuj lingvaj fenomenoj, ĝustigi la terminaron, sistemigi iujn demandojn. En ĝi mi prezentas iujn miajn konceptojn, kiuj diferencas de aliaj aŭtoroj. Mi opinias, ke sklava imito kaj ripetado de elstaraj esperantoloj (plejparte okcidentaj) ne ĉiam estas trafa kaj utila por la regula lingvoevoluo. En mia esperantologia laboro mi, kompreneble, ne agas tute izolate. Mi ofte konsultas kaj interŝanĝas pensojn kun elstaraj esperantoloj, antaŭ ĉio kun membroj de la E-akademio, kiaj Waringhien, Duc-Goninaz, Albault (Francio), Bormann (FRG), Setälä (Finnlando), Atanasov kaj Ĝuĝev (Bulgario), samkiel Grigorov, Blanke ka.

D. *Kiajn postenojn en la E-movado vi okupas nun?*

R. Mi estas ĉefredaktoro de la organo de MEM „Paco“, membro de la sekretariato de MEM, membro de la buroo de CE de BEA, komitatano de UEA, prezidanto de IUEF, prezidanto de la Filologa Sekcio de BEA, sekretario de la Instruista Sekcio.

D. *Rakontu, ni petas, pri iuj interesaj momentoj el via E-vivo!*

R. Da interesaj momentoj ekzistas dekoj. Mi diris, ke la tuta E-agado svarmas je interesajoj. Sed mi rakontos nur pri du. La E-movado en Varno tre vigligis en 1936. Nia klubejo estiĝis elstara kultura centro de la urbo. Tio ne restis kaŝita por la faŝistoj, kaj ili utiligis sian elprovan rimedon: en iu nokto de oktobro oni ĵetis bombon kontraŭ la klubejo. La bombo nekaŭzis seriozan damaĝon. La rezulto estis kontraŭa: la ĵurnaloj skribis pri tio kaj fakte faris reklamon objekte favore al ni. La klubeja vivo ankoraŭ pli entuziasmiĝis. Sed en decembro sekvis dua bombo, kiu faris la klubejon neutiligebla. Tiam mi verkis unu el miaj unuaj versoprovaj — „La senmorta Albatro“.

La dua interesa okazo ankaŭ montras la malfacilajn cirkonstancojn, en kiuj ni devis labori tiam. Foje ni havis nederlandajn (ŝajnas al mi) gastojn. Estis organizita komuna vespero en la domo de la estrarano Hristo Cvetkov. Al la gastoj ni montris bulgarajn naciajn dancojn kaj kantojn. Sed faŝistoj denuncis al la polico, ke tie okazas... „komunista konspiro“. Kaj jen la polico blokis la tutan kvartalon kaj volis aresti la „konspirantojn“. Influaĵaj personoj apenaŭ sukcesis konvinki la policestron, ke fakte ni plenumas nian patriotan devon, kaj eventuala enmiksiĝo de la polico povus provoki internacian skandalon.

Ĝenerale la E-vivo en Varno estis tre intensa. Kaj por ne perdi ligan kun tiu entuziasma tempo, nun mi pagis mian membrokotizon por la tempo de post 1948, kiam mi forlasis Varnon, ĝis la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en 1980 (t. e. por 33 jaroj). Tiel mia membreco en „Albatroso“ estos seninterrompa. Mi atendas la decidon de ties estraro pri mia reakcepto.

D. *Kion vi laboras nun?*

R. Mi ĵus transdonis al la redaktoro la manuskripton de nova granda Bulgara-Esperanta vortaro, kompilita de kolektivo sub mia gvido. Sed mia penso ankoraŭ ne povas liberiĝi de tiu peza kaj respondeca laborego. Ĉiam kiel koŝmaro (eĉ nokte) venas en mian kapon ideoj pri pligustigoj farendaj, pri mankoj ktp. En la lastaj tri jaroj mi eldonigis tri lernolibrojn, gramatikon kaj nun la vortaron. Tio ja estas grandega laboro, kaj mi sentas min tro laca. Mi ŝatus iomete ripozi. Sed... ĉu mi sukcesos?

D. *Per kio vi okupiĝas en via libera tempo? Ĉu vi havas hobion?*

R. Al mi ne estas tre klara la nocio „libera tempo“. Mia tuta tempo estas severe programita. Mi planas ankaŭ miajn ripozojn, ekskursojn... Bedaŭrinde, plej ofte ĝuste tiujn lastajn erojn de mia plano mi ne povas plenumi. Sed mi sentas jam amortiziĝon de la „maŝino“ kaj mi devas ilin jam observi kaj plenumi.

Vi demandas, ĉu mi havas hobion. Jes — Esperanto.

D. *Eĉ laŭ tiuj koncizaj respondoj videblas, ke vi dum preskaŭ duonjarcento disvolvis grandegan E-aktivecon. Ĉu vi partoprenis ankaŭ en alia socia aktiveco kaj ĉu vi havas iujn ŝtatajn aŭ sociajn honorigojn pro via agado?*

R. Mi jam diris, ke kiel lernanto mi partoprenis en pluraj organizaĵoj. Poste mi estis membro de eksterleĝa junulara distrikta komitato (kontraŭfaŝista) kaj post la liberiĝo el sub la faŝismo mi partoprenis en pluraj gvidorganoj: membro de urbodistrikta partia komitato, partia sekretario, kunlaboranto de distrikta partia komitato, estraro de urba sindikata organizaĵo, kunlaboranto de distrikta sindikata konsilio, membro de centra komitato de profesia asocio ktp. Pro mia tuteca socia aktiveco mi ricevis en diversa tempo 4 ŝtatajn ordenojn kaj 5 medalojn. Ili fakte prezentas agnoskon de mia E-agado, ĉar laŭ amplekso ĝi estas la plej granda inter ĉiuj ceteraj miaj aktivecoj.

D. *Kian bondezirojn vi direktus al la junaj bulgaraj esperantistoj? Kiel vi vidas la pluan evoluon de la E-movado en nia lando?*

R. La demando estas iom komplika. Mi fidas je la junularo. Tamen mi konstatas, ke la plej aktiva „esperantologia“ generacio iom post iom vakigas sian lokon en nia movado. Bedaŭrinde, mi ne vidas novan generacion, kiu replenigus ĝin laŭ amplekso kaj laŭ profundeco, laŭ vasteco de la intereso kaj la konoj.

Do, mia bondeziro al la junaj samideanoj jenas:

Enprofundiĝu en la lingvo, en ties subtilaĵoj, praktiku ĝin vaste kaj tiumaniere evoluigu ĝin! Ne akceptu senkritike la neologismojn, eĉ se ili venas de aŭtoritataj fontoj! Akceptu la stafeton de la flamo kaj entuziasmo de la antaŭaj esperantistaj generacioj!

Interjuinto: Kunčo Vălev



JUBILEA RENKONTIĜO EN TROJAN

La 12—13an de majo E-societo „Balkana Stelo“ en u. Trojan gastigis e-istojn el deko da loĝlokoj. Okazis la tradicia e-ista renkontiĝo en la urbo. Ĉi-jare ĝi estis dediĉita al la 1300-jariĝo de la Bulgara Ŝtato, al la 75-jara jubileo de la societo kaj al la Internacia Jaro de la Infano.

La 12-an de majo vespere en la salono de la Popola Soveto okazis solenaĵo, kiun partoprenis ĉirkaŭ ducent personoj. Riĉenhavan prelegon faris la lernantino Pepa Mitovska. La sekretario de BEA Kr. Karucin salutis en la nomo de la Estraro de BEA kaj dekoris per la honora ora insigno de BEA 11 meritoplenajn aktivulojn de „Balkana Stelo“, inter kiuj Nikola Vasilev — multjara kursgvidanto, Minko M. Conkovski — veterano, d-ro Petro Paĉev — prezidanto de la societo, Lalju Lalev — multjara aktivulo, ka. Per la arĝenta insigno estis distingitaj 8 membroj, per la bronza — 7. Salutojn kaj donacojn al la jubileuloj prezentis ankaŭ reprezentantoj de DE de Loveĉ kaj Gabrovo, de la E-societoj en Plevnen, Kazanlâk, Dimitrovgrad ka.

Estis prezentita riĉa belarta programo. Sekvis komuna vespermanĝo, poste dancoj kaj amika kunesto ĝis noktomezo.

La sekvan tagon la gastoj veturis per aŭtobusoj al la muzeo de la bulgara faŭno en V. Ĉerni Osâm, al la historia Trojana Monaĥejo kaj la Ekspozicio de Artmetioj en v. Oreŝak.

V. Mitovski

Ekspozicio de pentristo-esperantisto

De la 21 ĝis 28 de majo en Kjustendil la pentristo Svetozar Mateev, membro de E-societo „Flamo“ en la urbo, aranĝis ekspozicion de siaj pentraĵoj. La ekspozicio estis dediĉita al la lingvo E-o kaj la 120a naskiĝtago de ĝia kreinto d-ro Zamenhof.

La bildoj prezentis angulojn el Nesebar, Kârĝali, Kjustendil ka. Tuĉo, linogravurado, akvofarboj, krajono — tio estas la tekniko de la pentristo.

La ekspozicion vizitis la e-istoj kaj multaj civitanoj.

Evtim Anĉev

La 27an de aprilo en la Domo de la Amatara Arto en Varno okazis impona solenaĵo, dediĉita al la plej granda internacia festo de la laboruloj el la tuta mondo — la 1-a de majo. Ĝi estis organizita de la partia, sindikata kaj administra gvidantaroj de la Distrikta Popola Soveto.

Samtempe tio estis la unua publika manifestiĝo de la novefondita esperantista ĉambra ĥoro de E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Popola Soveto. La ĥoro konsistas el pli ol 30 e-istinoj. Vestitaj en belaj kostumoj kun brilantaj verdaj steloj surbruste la ĥoristinoj, membroj de „Fajrero“, bonege plenumis varian muzikprogramon, kio forte impresis la multenombrian publikon.

La ĉambra ĥoro de „Fajrero“ distingiĝis ankaŭ en la granda revuo de la amatara arto, organizita de la Distrikta Konsilantaro de la Sindikatoj; kaj ricevis duan premion pro siaj bonaj atingoj.

E-societo „Fajrero“ ĉe DPS en Varno trafis trovis novan formon de agado. La ĉambra ĥoro donos novajn eblecojn de estetika-krea manifestiĝo de ĝiaj pli ol 200 membroj. Ĝi aktive kontribuos por plialtigo de la komuna nivelo de la societa agado kaj de la tuta E-vivo en Varno. Samtempe ĝi estos efika propagandanto de E-o inter la ekstera publiko.

Lazar Andreev

La esperantistoj de Burgas manifestaciis

Ĉi-jare la e-istoj de Burgas unuafoje partoprenis la tutpopolan manifestacion je la 24-a de majo — la festo de nia nacia kulturo. Ili formis apartan grupon. Antaŭ la grupo marŝis la komsomolano Atanas Todorov kun verda standardo en la manoj.

Tra la feste ornamita centra placo de la urbo trapasis preter la oficiala tribuno e-istoj-veteranoj, inter kiuj la batalantoj kontraŭ la faŝismo gekamaradoj Polihronov, T. Aslanjan, K. Kunĉev, V. Darakĉieva, K. Bjandov k. a., membroj de la distrikta kaj urba E-estaroj, junaj kaj maljunaj e-istoj el ĉiuj generacioj.

El la oficiala tribuno la gvidaj personoj de la urbo sincere salutis la verdflegan grupon.

Elena Stojkova

La Ŝtata Soveto honoris per la alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — II grado k-don VIOLIN OLJANOV lige kun lia 60-jariĝo kaj pro lia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo kaj en la konstruado de la socialismo.

Ni gratulas k-don Oljanov pro la alta distingo kaj bondeziras al li longan vivon, firman sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn sur la nobla E-kampo!

La bulgara esperantistaro havas belan tradicion — celebri siajn vivajn famajn veteranojn, pionirojn de nia E-movado.

Je la 17a de majo La Sofia Esperantista Instruista Societo „Diĉo Petrov“ celebris la 96an naskiĝtagon de la E-veterano Stefan Minkov, eksinstruisto en la Mekanika-Teknika Lernejo, kaj lian 80-jaran aktivecon en la E-movado.

La salono de la Centra Domo de Instruisto estis plena. Honora prezidantaro okupis lokon. En la centro sidis la veterano Stefan Minkov. Ambaŭflanke de li sidis estimataj gastoj el Norvegio — Olav Reiersöl, emerita universitata profesoro pri stokastiko, kaj lia enzinio Margete Landmark, lektoro pri psikologio en la universitato de Oslo (Norvegio), Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“, Marin Marinov — sekretario de DE de BEA en Sofio, Cvetana Petrova — prezidantino de E-societo „Diĉo Petrov“, Boris Simeonov — vicprezidanto de la sama societo.

K-do Kunĉo Vâlev malfermis la solenan kunvenon per kortuŝaj vortoj kaj donis la parolon al B. Simeonov, kiu prezentis detalan raporton pri la vivo kaj aktivecoj de la celebrata veterano.

Stefan Minkov aliĝis al la E-movado jam 16-jara, kiel lernanto en la Marista Maŝinlernejo en Varno. Kiel maristo-teknikisto li navigis multajn jarojn kaj vizitis diversan landojn, kie li ĉiam uzis E-on. Minkov konatiĝis persone kun d-ro Zamenhof en Boulogne-sur-mer (Bulonjo ĉe maro) en 1907,

dum la tagoj post la 3a Universala Kongreso de Esperanto. Tuj post la Unua Mondmilito li estis sekretario de la Bulgara E-societo, partoprenis en la eldonado de nia organo „BE“, publikigis multajn artikolojn pri E-o. Li multe kontribuis por la fakultativa enkonduko de E-o en la bulgarajn lernejojn (1921—1923) kaj mem estis lektoro kaj kursgvidanto, kiel en nia lando, tieĉ ankaŭ fremdlande. Li estas aŭtoro de kelkaj lernolibroj pri mekaniko-tekniko kaj lernolibro de E-o por memlernado. Dum sia tuta vivo li ĉiam aktive kaj sindone laboris por la triumfo de E-o. Dum sia restado jen en Francio, jen en Rusio, jen en aliaj landoj li renkontiĝis kun famaj e-istoj. En Ruslando Minkov persone konatiĝis kun la mondfama verkisto Tolstoj, kiun li salutis esperantlinge en Jasnaja Poljana.

Al la E-veterano estis direktitaj gratuloj kaj bondeziroj, prezentitaj donacoj kaj florbukedoj.

Nia E-poeto Simeon M. Simeonov voĉlegis sian gratulversajon, dediĉitan al St. Minkov. La lasta strofo tekstas:

Nun la progres' de l'Esperanto kara
vin rekompencas kaj ĝojigas vin.
Do estu baldaŭ jubile' centjara —
de via vivo krono kaj kulmin'!

Estis plenumita belarta programo.

Ivan Draganov

LAŬ LA PAŜOJ DE APRILANOJ

Ĉi-jare dum la unuaj tagoj de majo estis efektivigita por 21a fojo la tradicia turista marŝo „Laŭ la paŝoj de aprilanoj“. Tiu ĉi marŝo ĉiam komenciĝas de urbo Koprivŝtica, kie pafis la unua fusilo de la ribelo kaj kie la arda Kableŝkov skribis la „persangan leteron“. La marŝo finiĝas je la historia loko „Oboriŝte“, kie en aprilo 1876 okazis la unua bulgara Granda Popola Kunveno. Ĉi tie tiam kunsidis 65 deputitoj de III revolucia distrikto kun centro Panagjuriŝte, kiuj prenis la historian decidon pri la ribelo.

Nun la marŝantoj-turistoj pasis laŭ la heroa vojo, vizitis diversajn karajn por ĉiu bulgara koro lokojn, aŭskultis surloke prelegojn pri la bataloj de la bulgara popolo kontraŭ la otomara kaj faŝista jugoj. Ili metis kronojn ĉe la monumentojn.

En la granda sofia turista grupo ĉi-jare partoprenis ankaŭ e-istoj. Je la fino de la marŝo la E-grupo ricevis specialan flageton pro sia bona prezentiĝo.

Dimitro Denĉev

La E-grupo antaŭ la monumento en „Oboriŝte“



ESPERANTO-BALO EN DOSPAT

La 28-an de aprilo E-societo „Fajrero“ en la rodopa urbo Dospat okazigis sian tradician grandan printempan balon. Por ĝi venis karaj gastoj el Plovdiv, Ĥaskovo, Smoljan, Rudozem, Asenovgrad, Goce Delĉev, Devin, eĉ el v. Vaklinovo, distrikto Blagoevgrad.

La feste ornamita plej bona en la urbo restoracio „Bor“ transformiĝis en Esperantujon. La balo komenciĝis sub la sonoj de „Vivu la verda stel’!“, kiun kantis la entuziasmaj ĉeestantoj kune kun la orkestro.

La tutvesperan programon gvidis Neli Petrova kaj Maria Taškova.

En la programo estis 13 konkursoj pri plej... sed vere plej kaj malplej...

Ekzemple pri plej serioza societa membro, pri plej aktiva kavaliro, plej kara gastoktp.

En la konkurso pri la plej originala E-elemento en la vestaĵo unuan premion gajnis M. Taškova, la duan — Elka Duĥova kaj la trian — la malplej originalan — Atanas Šopov, kiu eĉ ne havis E-insignon surbruste.

Ĝuste je la kvara horo matene oni elektis mis Esperanton — tio estis Stanka Belĉeva. La saman vesperon ŝi ricevis atestilon pri sukcese farita ekzameno de E-o.

En restoracio „Bor“ oni dancis ĝis la 3a horo, poste la agrabla kunesto daŭris ĉe la bordo de la ĉarma baraĵlago „Dospat“ ĉirkaŭ grandega fajro, disĵetanta fajrerojn. Ĉiuj sentis, ke pli ardaĵ ol ili estas la fajreroj en la koroj de la pli ol 200 membroj de E-societo „Fajrero“, kiuj tiel entuziasme laboras por la amikeco kaj paco inter la popoloj.

Por la bonega preparo de tiu ĉi brila solenaĵo aktive laboris Bojka Grozdanova, Irina Kadieva, Nadeĵda Dimitrova, Neli Petrova, Maria Taškova, Krasimir Gorov, Boris Ĉerkezov, Biser Mollov, Velurina Ĉirpanska, Katja Taŝeva, Tatjana Grigorova k. a. Ili ĉiuj meritis la sinceran dankon de la pli ol 150 partoprenintoj en tiu neforgesebla balo.

Emil Ĉirpanski

CELEBRO DE KIRIL KAJ METODIJ

La sofiaj e-istoj celebris solene la 24an de majo — la tutpopolan amatan feston de Kiril kaj Metodij. kaj ne nia naia kulturo. La kunveno okazis en la salono de E-societo „M. Gorkij“. La programon prezentis la Instruista E-societo „Diĉo Petrov“. Pri la epokfara afero de la du slavaj apostolĉj emocie parolis k-do Kunĉo Vălev. Li substrekiis, ke la laboro de la e-istoj estas intime ligita kun tiu afero. Kiril kaj Metodij batalis por demokratiigo de la kulturo, por egalrajteco de la naciaj lingvoj kaj kul-

turoj, por humanismo kaj amikeco en la rilatoj de homoj kaj popoloj. Ilia revolucia afero estas grandvalora kontribuo al la tuthomara progreso. Same revolucia estas la laboro de la e-istoj, kiuj al la mondo de multlingveco donas efikan rimedon por internacia kunlaboro, kompreniĝo kaj amikiĝo.

En la riĉa artprogramo partoprenis la Sofia E-horo. Individue plenumis kantojn per sia ĉarma tenoro Dimitro Denĉev. Duete kantis Stefka Kalimenova kaj Bojko Boĉev. Recitis Vera Văjarova, Stefka Markova kaj Maria Kolarova.

Fine la tuta ĉeestantaro starante kun entuziasmo plenumis la amatan himnon pri Kiril kaj Metodij: „Antaŭen, iru vi, popolo!“.

Ĉeestinto

EN PAZARĜIK BOLAS VIGLA ESPERANTISTA AGADO

Lastatempe E-societo „Radio“ en Pazarĝik kune kun aliaj socipolitikaj organizaĵoj efektivigis kelkajn aranĝojn, per kiuj tre bone propagandis E-on inter la vasta publiko.

En la urbo okazis recitalo de originala kaj tradukita poezio en E-o fare de la artistino Vera Văjarova (Sofio). Baldaŭ post tio en la E-klubo estis organizita vespero, dediĉita al Ĉeĥoslovakio, dum kiu k-do Petko Arnaudov rakontis pri sia vojaĝo al tiu lando kaj pri la someraj E-kursoj en Lanĉov. Li montris faritan de li amatoran filmon kaj multajn kolorajn diapozitivojn. La rakonto de Arnaudov kaj lia filmo vekis viglan intereson.

En la granda halo de la Distrikta Junulara Domo estis organizita koncerto de Veselin Damjanov — esperantisto, konata artisto en la Ŝtata Muzika Teatro „Stefan Makedonski“ — Sofio, laŭreato de naciaj kaj internaciaj konkursoj. Akompanis al li per piano Mariana Toteva, artistino en la sama teatro. La koncerto estis brila, la publiko — ravita. Tio estis granda tuturba kultura okazaĵo, kiun ĉeestis ankaŭ gastoj el proksimaj urboj kaj vilaĝoj.

Ilka Nikolova

Konstanta propaganda E-vitrino en Plovdiv

Je unu el la plej homoriĉaj lokoj en la centro de Plovdiv, ĉe la angulo de bul. G. Dimitrov kaj str. V. Haĝitanev, nemalproksime de la urba E-klubejo, en la komenco de la kuranta jaro aperis bela, verde kolorigita vitrino. En ĝi regule montriĝas en E-o kaj en bulgara lingvo materialoj (presaĵoj, fotoj, ilustraĵoj), kiuj rakontas pri gravaj naciaj kaj internaciaj eventoj kaj pri la partopreno de la bulgaraj e-istoj en

li, pri la multflanka agado de la internacia kaj nacia E-movadoj. La E-societoj en la urbo rakontas pri sia agado.

En la vitrino jam aperis esperantlingve la Konstitucio de USSR, la deklaro kaj la parolado de k-do T. Jivkov en Helsinki, materialoj pri la Semajno de Internacia Amikeco, pri la granda festo de Kiril kaj

Metodij — la unuaj apostoloj de la bulgara nacia kulturo. Nun la vitrino estas dediĉita al la Internacia Jaro de la Infano.

Pri kolekto de materialoj kaj ties aranĝo en la vitrino zorgas aparta komisiono.

La E-vitrino en Plovdis estas bona rimedo por konstanta kaj senpera kontakto de la e-istoj kun la vasta publiko.

Vladimir Jelev

Detlev Blanke

KIEL PRELEGANTO EN BULGARIO

Invitita de la Centra Estraro de Bulgara E-Asocio (BEA) mi havis la tre agrablan okazon prelegi en la Universitatoj de Plovdiv kaj Sofio kaj antaŭ aliaj e-istoj. Mi ja supozis, ke miaj bulgaraj amikoj certe preparos bone la restadon, sed ke ĉio donos tian imponan rezulton, mi, sincere dirite, ne estis atendinta. La restado mia de la 23a ĝis 28a de aprilo 1979 estiĝis neforgebla renkontiĝo kun aminda popolo, kun fortika E-movado.

Ne nur profunde reimpresis min la proverbe kora gastamo de la bulgaroj, la bonstataj urboj, la pejzaĝo, la afablaj homoj — ofte kaj prave laŭdataj. Reimpresis min la bonega organizo de mia restado entute, kiun tre lerte kaj sukcese certigis la gastigantoj.

Plovdiv, la dua plej granda urbo de Bulgario, konata pro la internaciaj foiroj, havanta ĝemelajn ligojn al Lajpcig, tiu Plovdiv sole meritis tutsemajnan restadon. La Distrikta Estraro de BEA, sub la gvido de ĝia prezidanto k-do Danĉev, tie havas propran oficejon, kiun gvidas juna, tre erudicia kaj ĉarma virino — s-nino Fani Miĥajlova. Si estis la ĉie senteblokaj en la urbo varme akceptata motoro kaj meritis specialan dankon.

Antaŭ ĉ. 130 studentoj de la Universitato mi prelegis en Esperanto (kun traduko de Fani Miĥajlova) pri „Rezultoj de interlingvistiko: raciigo de la internacia lingva komunikado“. La prelego elvokis tre vigan diskuton.

En la majstre konstruita junulara domo de Plovdis hejmas diversaj kluboj, inter ili tiu de „Scienc-fikcio“. La temo „La lingvo de la estonto — la estonto de la lingvo“ bone laŭis al la karaktero de tiu klubo. Neformala enkonduko tuj rezultigis ege vigan kaj tre klaran diskuton. Tre „facile“, se ne diri leĝere, la junaj diskutantoj surtabligis bazajn demandojn de la moderna lingvoscienco... Lernis ankaŭ la enkondukiinto.

Antaŭ la membroj de la E-societo „Kulturo“, siatempe distingita per la ordeno „Kiril i Metodij“, kies gvidantino estas s-ino Kurteva, mi havis la okazon prezenti kelkajn trajtojn de la E-movado en la 30-jara GDR. Dum tiuj plovdivaj tagoj tamen an-

koraŭ restis tempo por admiri la arkeologie ege interesan urbon, kies valoraj antikvaj kaj tradicibulgaraj kvartaloj estas sisteme flegataj kaj restaŭrigataj. Florantaj bedoj en verdverdaj parkoj! Tio dum aprilo, kiam la vetero en Berlino grizis.

Mi multon lernis pri la agado de BEA en Plovdiv kaj esperas, ke la kunlaboro inter la e-istoj de Plovdiv kaj GDR, speciale de Lajpcig, estonte plifortiĝos kaj plikonkretiĝos.

En Sofio la konataj kamaradoj Aleksiev, Gorov, Vălev, Marinov, Kanev, Karucin, Papazov k.a. meritis specialan dankon. Ili tre afable ĉion preparis. La prelegon en la Universitato de Sofio, kie en 1963 okazis la 48a UK, organizis Kunĉo Vălev, la konata lektoro de E-o en la Universitato, sekretario de BEA. Pli ol 200 aŭskultantoj sekvis la prelegon „Interlingvistiko kaj internaciaj lingvoj“. En Sofio ekzistas ĉirkaŭ 16 E-societoj. Ne mirinde, ke pli ol 300 homoj (!) kunvenis vendrede vespere (27. 4.) por partopreni festan programon omaĝe al la 30-jara datreveno de la fondiĝo de GDR. Post enkonduko de la prezidanto de BEA, la verkisto Hristo Gorov, mi havis la eblecon fari koncizan paroladon. Poste sekvis vere kortuŝa programo. E-koruso kantis, artistoj recitis poemojn (i. a. ankaŭ „Pripensu, sinjor“ senatoro“ de Manfred Arnold). Poste sekvis la esperantigita kolorfilmo „Kvar ĉapitroj GDR“.

Dum mia restado en Plovdiv kaj Sofio ankaŭ restis tempo por multaj valoraj kontaktoj kaj interparoloj. Tiel ekzemple mi povis sonbendintervjui la konatan veteranon de la Bulgara Laborista E-Asocio (Bu LEA) Ivan Keremidĉiev—Esperov. Kaj restis tempo por preparoli kun kelkaj kompetentuloj la estontan sciencon agadon en Bulgario.

Entute, mia restado en Bulgario denove konvinkis min pri la celkonscia socialisma konstruado, la multflankeco de la Bulgara E-movado, la ĉarmo de la bulgaraj homoj kaj pri la beleco de tiu lando. Ĉio ĉi kaj multo alia estas pli ol sufiĉa kaŭzo por pliintensigi la rilatojn inter niaj ambaŭ landoj ankaŭ helpe de la Internacia Lingvo.



Moskvo, 14. III. 1979

PRI LA STATO KAJ PLIEFIKIGO DE LA LABORO DE LA SOVETAJ E-ISTOJ KAJ PLIBONIGO DE ILIAJ INTERTACIAJ LIGOJ

El la raporto de prof. d-ro Mahomet ISAJEV

Hodiaŭ estas fondata nova socia organizaĵo — Asocio de Sovetaj E-istoj. Citage ni devas prilumi la staton de nia laboro, pridiskuti la ekzistantajn problemojn kaj skizi vojojn por pliefikigo de nia laboro en la batalo por paco, internacia kunlaboro, por vastigo de la kontaktoj.

Pli ol 50 milionoj da nialandaj civitanoj partoprenas la agadon de la sovetaj societoj de amikeco, asocioj, sekcioj, respublikaj societoj de amikeco, iliaj filioj en urboj, fabrikoj, kaj uzinoj, kolĥozoj, sovĥozoj, sciencaj kaj kulturaj institucioj.

Nuntempe la Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco (SSOD) subtenas kontaktojn kun 8000 organizaĵoj kaj multaj agantoj en 140 landoj de la mondo.

Sian kontribuon donas al la agado de SSOD ankaŭ la e-istoj, ligitaj kun la Unio pere de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj, kreita en 1962.

Ce kreo de la E-komisiono ĉe SSOD antaŭ ĝi estis starigita la tasko: per starigo kaj evoluigo de kontaktoj kun eksterlandaj e-istaj organizaĵoj kontribui al disvolvo kaj plifirmigo de amikeco, interkompreno kaj kultura kunlaboro inter la popoloj de Soveta Unio kaj eksteraj landoj.

Estas tute kompreneble, ke en la procezo de aktiva agado la amplekso de laboro de la E-komisiono daŭre kreskis. Ĝi inkluzivas starigon de kontaktoj kun progresemaj agantoj de la monda E-movado, ĉiujarajn vojaĝojn al tutmondaj E-kongresoj, aktivan partoprenon en la laboro de la Mondpaca E-Movado (MEM), alianco kun la Monda Paĉkonsilio, renkontiĝojn kun eksterlandaj e-istoj (gastoj de USSR).

La eldona agado dum la lastaj jaroj estas karakterizebla per preparo kaj emisio de sufiĉe granda kvanto da libroj kaj revuoj. Inter ili aparte notindas: bulteno „Por la paco“ (12 numeroj), revuo „Paco“ — organo de la Mondpaca E-Movado (4 numeroj), pluraj politikaj kaj literaturaj broŝuroj, entute 45 eldonaĵoj. Krom la eldona produktaĵo de moskvaj e-istoj aperis pluraj eldonaĵoj en la respublikoj.

Sovetaj e-istoj partoprenis preskaŭ ĉiun Universalajn Kongresojn de la lastaj jaroj. La lastan 63an Kongreson de UEA vizitis rekorda kvanto de sovetaj e-istoj — 105 personoj.

La delegitaro de sovetaj e-istoj, konsistanta el tri specialigitaj turismaj grupoj, estis en Bulgario de la 22a de julio ĝis la 5a de aŭgusto. Ĝi partoprenis renkontiĝojn kun aktivuloj de la societo de bulgara-soveta amikeco kaj e-istoj en la urboj Sofio, Plovdiv, Gabrovo, kaj ankaŭ la Kongreson de UEA kaj la Konferencon de MEM ekde la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto en Varno.

Dum la Kongreso okazis konversacioj kun la prezidanto de UEA, dum kiuj ĉeestis estraranoj de UEA. La gvidantaro de UEA alte taksis la partoprenon de granda delegitaro de sovetaj e-istoj en la Kongreso. Ĝi esprimis pretecon pridiskuti konkretajn demandojn de plua kunlaboro kun la sovetaj e-istoj.

La sovetaj e-istoj dank' al sia sukcesa kaj multjara laboro pruvigis al la tuta mondo, ke ili ekzistas kaj sukcese agas, ke E-o en nia lando ne estas persekutata, kiel iuj ŝatus prezenti la staton de la afero.

La E-movado estas nedisigeble ligita kun la scienco. Ne hazarde E. K. Drezen kaj aliaj aktivaj sovetaj e-istoj estis samtempe ankaŭ interlingvistoj-esperantologoj. Kaj hodiaŭ ni ne povas ne rememori nian unuan prezidanton kaj gvidanton de la sovetaj interlingvistika skolo profesoron E. A. Bokarev.

El la vivo de la sovetaj e-istoj (Kujbiŝev)



Ni scias, ke E-o havas multajn adeptojn, sed ekzistas ankaŭ kontraŭuloj. Ĉe tio esta karakterize, ke la lastaj kutime havas treege malproksiman imagon pri la problemo. Kompreneble, tial ilia negativa rilato ne povas esti ende argumentita.

La interlingvistoj de nia lando komprenas la tutan komplikecon de solvado de la problemo pri internacia helpa lingvo. Ĉi tie en unu nodon kunplektiĝis faktoroj de plej diversaj specoj: politikaj, ekonomiaj, ideologiaj, sociologiaj lingvistikaj. Tial por plej rapida kaj optimuma solvo de la problemoj de objektiva kaj subjektiva karaktero, ekstarantaj sur la vojo, necesas skrupula esplora laboro en ĉiuj menciitaj direktoj, endas maksimuma kompreno kaj kunlaboro de sciencistoj de multaj najbaraj scifakoj.

Jam ĉirkaŭ dek jarojn ĉe la scienca konsilantaro pri la kompleksa problemo „Leĝoj de evoluo de naciaj lingvoj lige kun

evoluo de socialismaj nacioj“ ekzistas Sekcio de Interlingvistiko. Dum ĝiaj kunsidoj estis pridiskutitaj kelkaj dekoj da prelegoj. Surbaze de ili estas eldonita la speciala kolekto „Problemoj de la interlingvistiko“. Estas preparita por presado granda kolektiva verko „Problemoj de la internacia helpa lingvo“, en kiu estas prilumataj pluraj demandoj de la teorio, historio, strukturo kaj lernometodiko de E-o.

La sovetaj interlingvistoj en sia teoria kaj praktika agado devas baziĝi sur certaj principoj, kies ĉefa enhavo, laŭ nia opinio, konsistas el jeno. La interlingvistiko kiel scienca branĉo ĉe ni disvolviĝas sur la firma bazo de marksisma-leninisma metodologio kaj lenina nacilingva politiko. Baziĝante sur la marksisma-leninisma tezo pri plena egalrajteco de ĉiuj lingvoj, ni stariĝas la „artejaritan“ helpan lingvon kontraŭ nek interpopolaj, nek tiel nomataj „mondaj“, nek des pli naciaj lingvoj.

MI ALPAŬDAS AL LA KREIĜO DE ESPERANTISTA ASOCIO ...

La mateno de la 14a de marto en Moskvo estis neĝokota kaj malvarmeta — ĉu malfrua vintro, ĉu frua printempo. Sed pli ol cent moskvanoj kaj gastoj, kolektiĝintaj en la Domo de Amikeco en Kalinin-avenuo, venis ĉi tien antaŭsente de festo. De sur la muroj de la halo ilin salutis afiŝoj en la rusa kaj E-o: „Tutsovetata fonda konferenco de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj“.

La unua impresio: la e-istoj estas homoj tre diversaj. Moskva profesoro Grigorij Demidjuk, tradukinta en E-on la verkon de V. I. Lenin „Ŝtato kaj revolucio“, kaj studento el Krasnojarsk Vladimir Sapoŝnikov, edukistino de infangardeno el Rostov Tatjana Kurepina kaj ministro pri klerigo de Estona SSR Ferdinand Eisen, elektromuntistino el Rigo Saulcerite-Neilande kaj akademiano de Armena Scienca Akademio Gurgen Sevak. Sed estas io komuna, unuiganta ilin ĉiujn: la firma deziro uzi la internacian planlingvon E-o por disvastigi la helan ideon de paco kaj socialismo.

La deka horo matene. La konferencanoj eksidas ĉe longaj tabloj. Ĉe la prezida tablo estas respondecaj funkciuloj de CK de KPSU, CK de VLKSM, VCSPS kaj Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj (SSOD), membroj de la E-komisiono de SSOD. Estas akceptata la tagordo. La parolon por raporto „Pri la ŝtato kaj rimedoj por plibonigo de la esperantista laboro en la lando kaj pliefikigo de la internaciaj rilatoj“ ricevas la prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj **prof. Mahomet Isajev** — doktoro de filologiaj sciencoj.

La demandon pri kreo de ASE prilumis en sia raporto **Mihail Pesljak** — vicprezidanto de la Prezidio de SSOD, prezidanto de la Prepara Komitato de la Fonda Konferenco de ASE.

Li diris, ke la Organiza Komitato de la Fonda Konferenco difinis el diversaj fontoj, ke la nombro de la interesigantoj pri E-o en nia lando atingas 9—10 000 personojn, el kiuj la duono (4,5—4,7) lernas la lingvon en 90 rondetoj, funkciantaj ĉe sindikataj kluboj, kulturdomoj, urbaj kaj regionaj komitatoj de Komsomolo.

La ĉefaj laborformoj estas: lernado de la lingvo, legado de literaturo, organizado de programaj vesperoj, korespondado kun sovetaj kaj eksterlandaj e-istoj ktp. Lastatempe ĉiujare estas organizataj someraj tendaroj.

Dezirante partoprenigi la sovetajn e-istojn en internaciaj ligoj, SSOD kreis en 1962 E-komisionon kaj faris certan laboron, pri kio parolis prof. Isajev.

La laboro de la ekzistinta ĉe SSOD Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj meritas bonan aprezon. En la nomo de SSOD mi transdonas al la tuta konsisto de la Komisiono grandan dankon kaj esprimas certecon, ke la kamaradoj el tiu komisiono iĝos aktivaj partoprenantoj de la fondata nun Asocio de Sovetaj E-istoj.

Tamen lastatempe en la agado de la sovetaj E-istoj aperis seriozaj mankoj. Rondetoj kaj kluboj laboras dise, la studlaboro estas farata nekontentige. La instruantoj ne ĉiam havas sufiĉan ĝeneralan kleron. Ofte ne sufiĉas lerniloj, kiuj praktike ne estas eldonataj.

La Buroo de la Prezidio de SSOD, la



Sekretariato de VCSPS kaj la Sekretariato de CK de VLKSM, pridiskutinte ĉiufanke la aferstaton en nia E-movado, trovis necesa entrepreni rimedojn por ordigi la agadon de la e-istoj, por plibonigi ilian laboron en la sfero de internaciaj ligoj.

SSOD, VCSPS kaj CK de VLKSM plenkongrete substrekis en la akceptita la 27an de decembro 1978 komuna decido, ke flanke de la profsindikataj kaj komsomolaj organizaĵoj kaj amikec-asocioj devas plifortigi la helpo al la e-istoj. Ekzemple, nova klubo povas esti kreita, se al ĝi estas garantiita gvido flanke de uzina (fabrika) profsindikata komitato, se ĝi havas ejon, lernilojn, kvalifikitan instruiston.

La demando pri fondo de Asocio de Sovetaj E-istoj ne estas tute hazarda. Paroloj kaj sugestoj pri tio rondiris jam delonge. SSOD, VCSPS kaj CK de VLKSM per la menciita komuna decido subtenis la venintajn al ili proponojn pri kreo de Asocio de Sovetaj E-istoj.

La Asocio estas kreata enkadre de la Unio de Sovetaj Amikec-Asocioj kun partopreno en la fondo kaj plua ĝia aktivado de VCSPS kaj CK de VLKSM.

La preparlaboro de la nuna Konferenco kaj aliaj demandoj, ligitaj kun la kreo de la Asocio, estis komisiita al la Prepara Komitato, kiu establis aktivajn ligojn kun la lokaj profsindikatoj kaj komsomolaj organizaĵoj, amikec-asocioj, apartaj kluboj kaj rondetoj. La ideo pri kreo de la Asocio ĉie estis renkontita aprobe. Ni esperas, ke ankaŭ nia Konferenco pasos samspirite.

Vladimir Samodaj rakontis pri la unuaj, eksperimentaj E-elsendoj de Moskva Radio, kiujn reeĥis pluraj centoj da radioaŭskultantoj el dekoj da landoj.

Kreskas la intereso al la kulturo de nia lando. Pri tio interalie atestas ankaŭ tiu resonado, kiun kaŭzis eksterlande niaj literaturaj eldonoj en E-o. Tamen dume ni eldonis malmulte, substrekis la parolanto. Sed la intereso al la rusa literaturo estas granda, kaj la verkoj de niaj verkistoj en la internacia lingvo aperadas ne nur en nia lando, kaj ne ĉiam en bonaj tradukoj.

Ce ni en USSR estas perfektaj tradukistoj en E-on — la moskvano Konstantin Gusev, la odesano Sergej Rubljov ka. Ili tradukis en la Internacian Lingvon tiajn ĉefverkojn kiel „Eŭgeno Onegin“ de A. Puŝkin kaj „Vladimir Iljiĉ Lenin“ de Vl. Majakovskij, kio atestas ankaŭ pri la matureco de E-o kiel lingvo de tradukoj. Bedaŭrinde, ne ĉion el la tradukitaj verkoj oni sukcesis publikigi. Sed tio estas nia kultura heredaĵo, kaj post la kreo de la Asocio ĝi ne devas resti senuze. Samtempe oni devas kreskigi novajn talentajn tradukistojn, kapablajn transdoni en E-o la plej bonajn literaturajn verkojn de la sovetaj popoloj.

Pri la batalo de la e-istoj por paco ra-

kontis **Dmitrij Perevalov**. La 28 an de januaro ĉi-jare junaj moskvaj e-istoj organizis la unuan en la mondo dimanĉlaboron de solidareco kun la popolo de Kampuĉio. Kune kun ili en la olimpika konstruejo en Moskvo laboris studentoj el Francio, Vjetnamio, Srilanko kaj aliaj landoj. La perlaborita mono estis sendita al la helpofonduso por la popolo de Kampuĉio. Tiu iniciato estis respegulita en la soveta kaj eksterlanda gazetaro, detalan raporton pri ĝi publikigis la vjetnama ĵurnalo „Kuan doj njan zan“. Kaj la vizitinta Moskvon ĝenerala sekretario de CK de Unueca Fronto por Nacia Saviĝo de Kampuĉio k-do Roĥ Samaj esprimis al la moskvanoj dankon.

Konklude Dmitrij Perevalov proponis, ke oni sendu telegramon subtene al Vjetnamio, rebatante la ĉinan agreson. La propono estis unuanime akceptita de la konferencanoj.

La delegito de Estonio **Jan Ojalo** rakontis: en nia respubliko estas emisiitaj kelkaj libroj en E-o kun suma eldonkvanto 49 000 ekzempleroj — verkoj de plej bonaj estonaj verkistoj. Helpe de e-istoj, sendantaj tiujn eldonaĵojn al eksterlandaj amikoj, niaj verkistoj estas legataj en multaj landoj, de Kubo ĝis Japanio. Ĉu tio ne estas ekzemplo kiel la Internacia Lingvo helpas popularigi la nacian kulturon de negranda popolo?

E-o helpas al ni, barnaulaj e-istoj, diri delegito el Barnaulo **Anatolij Gonĉarov**, porti la vortojn de vero malproksimen ekster la limoj de nia lando. Ni ĉiam volontereerĥas leterojn de amikoj, kiuj servas al la internacia edukado de junularo. Ekzemple estis ĝojige ekscii, ke niaj nederlandaj kamaradoj konstruis memorialon sur insulo en Norda Maro, kie dum la milito batalis sovetaj partizanoj. Interese estis legi konfesan leteron de korespondanto el Svedio: „Vi estas feliĉaj, geknaboj, ĉar en via lando lerni povas ĉiu. Ĉe ni elteni studadon en altlernejo povas nur riĉula poŝo, sed se oni estas malriĉa, oni dronas en ŝuldoj.“

Tiajn leterojn ni publikigas en sovetaj kaj eksterlandaj ĵurnaloj. La vorto havas grandan penetran forton, kiam ĝi iras de koro al koro, kaj la lingvo E-o donas al ni tiun eblon — komunikiĝi sen perantoj. Kiam antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj ni dissendis alvokon sendi al ni en Barnaulon infanajn desegnaĵojn, reeĥis 1500 korespondantoj el 18 landoj. Tiamaniere ni organizis migran ekspozicion, aldoninte al ĝi subskribojn en E-o kaj la rusa lingvo. Jam multajn jarojn ĝi kun konstanta sukceso estas eksponata en Omsk, Ufa, Ĉeljabinsk kaj aliaj urboj de la lando. Ekspozicio de desegnaĵoj de sovetaj infanoj, kolektita de ni, stafete iras tra eŭropaj landoj. Antaŭ nelonge, ekzemple, ĝi estis montrita en Hispanio. Kaj ĉie la lokaj e-istoj aldonas al la de-

segnaĵoj subskribojn en siaj naciaj lingvoj kaj helpas al ĝia popularigo.

La Internacia Lingvo helpas al eksterlandaj e-istoj konatiĝi kun nia lando, notis la prezidanto de la E-komisiono ĉe Leningrada Filio de SSOD **Semjon Podkaminer**. Nur dum la lastaj jaroj la e-istoj de nia urbo akceptis 1500 gastojn el eksterlando, inkluzive specialan amikectrajnon el GDR kun 150 e-istoj.

Pri unu el la eksterlandaj vojaĝoj rakontis la instruisto el Ufa **Boris Kolker**. Ekvidinte dekojn da sovetaj e-istoj, germano el FRG miris: „Ĉu do ĉe vi estas nuligita la malpermeso pri eksterlandaj veturoj?“ Kaj kiam Kolker demandis sian japanan korespondanton, kial tiu ne plu skribas al li, la respondo estis: „Mi aŭdis, ke al sovetanoj oni malpermesas korespondi kun eksterlandanoj.“ Do necesis klarigi al ambaŭ sinjoroj, ke ili estas trompitaĵoj de la okcidenta propagando kaj ke similaj „malpermesoj“ en USSR neniam estis.

Dirante la konkludan parolon, **Mihail Peŝljak** pledis por plifortigo de la internaciaj kontaktoj de sovetaj e-istoj — eksterlandaj vojaĝoj, tendaroj kun partopreno de eksterlandaj e-istoj, interŝanĝo de leteroj

kaj literaturo. Li substrekiis, ke necesas plifortigi la eldonan laboron: eldoni en E-o pli da libroj, inkluzive la lernajn, emisii filmojn, eldoni revuon en la Internacia Lingvo. Tamen ĉio ĉi, notis li, iĝos realo nur ĉe aktiveco de la e-istoj, ĉe ilia kapablo levi la e-istan laboron sur novan ideologian ŝtupon.

Post tio la e-isto veterano **Nikolaj Danovskij** voĉlegis la salutmesaĝojn al la Fonda Konferenco — de la E-asocioj el Hungario kaj GDR, de Internacia Ligo de E-Instruistoj, de la redakcio de aŭstra bulteno „Internaciisto“. La eksterlandaj amikoj substrekas, kiom gravas kaj por ili kaj por la sovetaj e-istoj la kreigo de ASE. Ekde nun komenciĝas nova etapo en uzado de la Internacia Lingvo por disvastigo de la ideoj de paco kaj amikeco inter la popoloj.

Kaj mi rememoras linion el letero de alia malnova e-isto — **Stepan Titov**, la patro de kosmonaŭto-2: „El mia tuta animo mi aplaudas al la kreigo de la asocio de e-istoj en nia lando.“

Mi opinias, ke al li aliĝos milionoj da amikoj de la Internacia Lingvo en USSR kaj eksterlande.

Aleksandro Ĥarkovskij

DECIDO

de la Tutsoveta Fonda Konferenco de la Asocio de Sovetaj E-istoj

Aŭskultinte kaj pridiskutinte la raporton pri la stato kaj rimedoj por plibonigo de la esperantista laboro en la lando kaj la demandon pri fonda de Asocio de Sovetaj E-istoj (ASE), la Konferenco, reprezentata E-klubojn kaj E-organizaĵojn de urboj, provincoj, regionoj, aŭtonomaj kaj uniaj respublikoj, aprobas la decidon de Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj (SSOD), Tutsoveta Centra Konsilantaro de Profesiaj Sindikatoj (VCSPS) kaj Centra Komitato de Tutsoveta Lenina Komunista Junulara Unuiĝo (CK de VLKSM) pri kreo de la Asocio kaj akceptas ĝin kiel esprimon de zorgo kaj helpo pri ordigo kaj evoluigo de la E-movado en nia lando.

La ĝenerala sekretario de CK de KPSU, prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR kamarado **L. I. Breĵnev** plurfoje substrekiis la grandegan signifon de la fortoj de sociaktivularo en solvo de gravaj internaciaj problemoj. La sovetaj e-istoj opinias sia unuaranga devo aktive partopreni, kune kun vastaj rondoj de la sovetata sociaktivularo, en la nobla batalo por ĉiurimeda larĝigo de la fronto de pacadeptoj. Ni konsideras la internacian helpan lingvon E-o kiel unu el la iloj por disvastigi la veron pri nia sovetata realaĵo, pri evoluo de la ekonomio, scienco kaj kulturo de

USSR, pri la interna kaj ekstera politiko, de nia ŝtato kaj disvastigi la ideojn de interkompreno, kunlaboro kaj interpopola amikeco, malstreĉigo de la internacia tensio, tutmonda paco. E-o devas helpi al la sovetaj e-istoj por konatiĝo kun la vivo, laboro, kulturo kaj sociaj problemoj de la laboruloj en eksteraj landoj, plifirmigi la aferon de la internaciismo. La decido pri kreo de la Asocio metas sur nin altan respondecon kaj devigas nin ne nur vastigi, sed ankaŭ profundigi nian agadon en la sfero de evoluigo kaj firmigo de la internaciaj ligoj, fari ilin pli efikaj.

Dekretante la fondon de la Asocio de Sovetaj E-istoj, la Konferenco DECIDAS:

1. Konsideri ĉefa tasko de la Asocio kaj ĝin enirantaj E-organizaĵoj partopreni, helpe de la lingvo E-o, en firmigo de la amikeco kaj evoluigo de la kulturaj ligoj de la sovetata popolo kun la popoloj de la eksteraj landoj por la interesoj de firma paco, sekureco kaj kunlaboro; helpi al e-istoj pri studado aŭ profundigo de la scioj de la lingvo E-o; eduki ĉe la sovetaj e-istoj la sentojn de patriotismo kaj internaciismo, nekompromisemo al reakcia ideologio, al faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto. La Asocio kontribuos al evoluigo de la internaciaj ligoj de la sovetaj e-istoj



kaj kunordigos la agadon de lokaj E-organizaĵoj en la interna kaj internacia sferoj.

2. Proponi al la Estraro de la Asocio en laŭeble nelonga tempo en intima kontakto kun la sindikataj kaj komsomolaj organizaĵoj efektivi laboron pri ordigo de la antaŭviditaj en la Regularo lokaj organizaĵoj (kluboj, rondetoj, urbaj, provincaj, regionaj kaj respublikaj filioj aŭ asocioj) por altiri ilin al aktiva laboro pri vastigo kaj firmigo de la internaciaj ligoj kun eksterlandaj e-istoj en la komuna batalo por interkompreno, malstreĉiĝo, malarmado kaj tutmonda paco. Dum ses monatoj ellabori kaj konfirmi tipan regularon de la E-kluboj.

3. Por pli efika organizo de la laboro rekomendi al la Estraro krei specialigitajn sekciojn aŭ komisionojn (organizamasan, pri internaciaj ligoj, pri gazetaro kaj informado, pri akcepto kaj helpo al eksterlandaj e-istoj turistoj, junularan, virinan ka).

Komisii la gvidon de la sekcioj kaj komisionoj al spertaj kaj kvalifikitaj aktivuloj e-istoj.

4. Komisii al la Estraro peti SSOD, VCSPS kaj CK de VLKSM prepari la demandon pri establo de eldonado de sociopolitika kaj literaturlingva revuo en E-o kaj informa bulteno de la Asocio en la rusa lingvo kaj ankaŭ pri eldonado de lerniloj, sociopolitika kaj belarta literaturo en E-o. Starigi kontakton kun administrejoj pri rimedoj de amasa informado (preso, agentejo APN, Stata Komitato pri Televido kaj Radio) por prilumadi la agadon de la Asocio kaj utiligi E-on el la vidpunkto de la taskoj de ASE.

5. Rekomendi al la Estraro evoluigi kontaktojn kun internaciaj E-organizaĵoj tiel

universalkarakteraj (UEA, TEJO), kiel ankaŭ fakaj kaj naciaj. Entrepreni rimedojn por garantii aktivan partoprenon de la Asocio en la 64a Kongreso de UEA kaj la 35a Kongreso de TEJO kaj studi la demandojn pri kunlaboro kun tiuj organizaĵoj.

6. La Estraro kaj la lokaj organizaĵoj aktive partoprenu la laboron de MEM.

7. Praktiki pli vastajn interŝanĝojn kun la E-organizaĵoj de la socialismaj landoj, uzi la kanalojn de la specialigita turismo, interŝanĝo de literaturo k.a. por realigo de ligoj kaj kontaktoj.

8. Komisii al la Estraro ekkontakti koncernajn organizaĵojn por garantii aktivan organizatan partoprenon de e-istoj en gravaj soci-politikaj aranĝoj en la proksimaj jaroj (efektivigo de la Jaro de Infano, Olimpiko-80 ka).

9. Proponi al la Estraro de la Asocio ĉe ellaboro de planoj por praktika laboro konsideri la sugestojn, prezentitajn de la delegitoj dum la laboro de la Konferenco, kaj entrepreni rimedojn por ties realigo.

La Konferenco alvokas ĉiujn sovetajn e-istojn aktive partopreni la laboron de la Asocio, kiu devas esti farata sub la signo de firmigo de la internacia solidareco de la laboruloj en la batalo por paco, amikeco, libero, egaleco, frateco kaj feliĉo de ĉiuj popoloj.

* * *

La Konferenco certigas, ke la sovetaj e-istoj, kiel unu el la taĉmentoj de la sovetita sociaktivularo, kune kun la sovetaj popolo subtenados kaj realigos la internan kaj eksteran politikon de la Soveta Stato KPSU kaj la Politburoo de CK de nia partio frunte kun kamarado L. I. Breĵnev-

GVIDORGANOJ DE ASE

La Konferenco elektis jenajn gvidorganojn de ASE:

ESTRARO — 59 personoj, inkluzive de PREZIDIO:

Prezidanto — prof. d-ro Mahomet ISAJEV

Vicprezidantoj: Nikolaj ZUBKOV

Anatolij MAKOVSKIJ

Semjon PODKAMINER

Vladimir SAMODAJ

Respondeca sekretario — Anatolij BERJOZA

Membroj: Georgij KANAJEV

Boris KOLKER

Aleksandro KROLEVIĈ

Eela KUUSKJUL

Nikolaj MUĤIN

Dmitrij PEREVALOV

Rafael SAAKOV

Tutkoraŭ varman saluton al la frataj sovetaj e-istoj! Firmiĝu ĉiam pli kaj pli la profunda amikeco kaj ĉiufanka kunlaboro inter la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj serve al la amikeco inter la popoloj, al la tutmonda paco kaj socialismo!



INTERNACIA JARO DE LA INFANO

Vasil Borovanski

LA SPERTOJ DE LA CENTRA STACIO DE JUNAJ TEKNIKISTOJ — KONTRIBUO POR FELIĈA NUNTEMPO KAJ ESTONTO DE LA INFANOJ

La Centra Stacio de Junaj Teknikistoj* — eksterlerneja instruaduka institucio, gvidata de la Ministerio de Popola Klerigo kaj la Centra Komitato de Dimitrova Komunista Junulara Asocio — troviĝas meze de bunta bukedo el altaj pinoj, akacioj, kaŝtanoj, tilioj, cedroj.

Tamen ne tiom la trankvilo de la verda arbaro, la bonodoro de la florbedoj kaj la puraj aleoj de la belega parko allogas tien ĉi la infanojn de la ĉefurbo. Preparinte siajn lecionojn kaj hejmezercojn, la junaj teknikistoj ĉi tie, en la kabinetoj de la Stacio, sin donas al interesaj kaj instruaj studrondaj okupoj.

Jen en la kabineto por ŝipo-, avio-, raketo- kaj aŭto-moto-modelismoj la difinita tempo por krea laboro ĉiam ŝajnas mallonga al la studrondanoj. Surmetinte siajn laborvestojn kaj enprofundiĝinte en siajn teknikajn taskojn, ili disegnas, ellaboras la detalojn de siaj modeloj, muntas ilin, eksperimentas.

— Estas vera arto, — diras la merita aganto de modelismoj Georgi Vodeničarov, — la scipovo de la infanoj, uzante diversajn materialojn kaj atingeblajn por ili teknologiojn, modeladi proksimume ĝuste tiel la konstruon de agantaj transportaj maŝinoj, kiel ankaŭ ilian fundamentan moviĝon. La realan funkcion de tiu ĉi moviĝo **tamen** oni povas efektiviĝi nur per konstruado **de la tiel nomataj** miniaturoj de agantaj maŝinoj, kiuj estas **tute taŭgaj** por direktado eĉ de plej junaj teknikistoj. Ekzemple, la faritaj de la studrondanoj boatoj, jaĥtoj, aŭtomobiloj, motorvehikloj, „delta-planeoj“ (glisiloj kun flekseblaj

* Interesitoj povas skribi je adreso: Centra Stacio de Junaj Teknikistoj, placo „Velčova Zavera“ 2, 1126 Sofio. Respondo certa. Kontaktoj dezirindaj.



flugiloj) ktp. devas povi ne nur „porti“ siajn kreintojn, sed ankaŭ doni al ili eblecon plenumi interesajn aktivecojn, inkluzive sportajn konkuradojn.

— Ĉio ĉi estas ĝuste tiel, — enmiksiĝas en la konversacion Ljudmil Mandičev, studrondano pri ŝipmodelismo, por subteni la penson de sia gvidanto. — Nur la uzado de la ellaboritaj de ni modeloj en nia praktika agado helpas al ni malkovri iliajn difektojn kaj korekti ilin aŭ krei tute novajn.

— Ege allogas nin, — aldonas la studrondano Georgi Savov, — la laboro je nuntempaj naciaj kaj internaciaj teknikaj temoj, sed tre interesaj estas ankaŭ la okupoj pri historiaj teknikaj temoj, speciale kiam ni rekreas la teknikon de niaj avoj kaj praavoj. Tamen vera teknika kreado estas en la okupoj pri la tiel nomata tekniko de la estonteco, dum kiuj oni kreas modelojn de ankoraŭ ne ekzistantaj maŝinoj.

En la kabineto de maŝinkonstruado la studrondanoj ekkonas la fundamentajn principojn de konstruado de la „produktantaj“ maŝinoj de industrioj, agrikultura maŝinizado, publikaj servoj. Tie ĉi ili lernas fari el metalo ne nur apartajn detalojn kaj malgrandajn belajn aĵojn, sed ankaŭ tutajn maŝinkonstruadojn. En tiu ĉi kampo la temoj estas nelimititaj. Ilia celkonforma elekto kaj la konstanta serĉado de la krea momento en ĉiuj laborprocesoj vekas ĉiam pli kaj pli grandan intereson ĉe la junaj maŝinkonstruantoj.

Interesa kaj alloga estas la laboro en la kabineto por lignotekniko kaj interna arkitekturo. En ĝi la studrondanoj ellaboras el ligno ne nur projektojn pri la dominterio, sed ankaŭ belajn objektojn por lernejo, junpionira somertendaro, kvartala klubo ka. La temoj ne estas limigitaj, tial la elekto estas ĉiam sukcesa. Je dispono al la studrondanoj estas eksperimentitaj desegnaĵoj kun detalaj instrukcioj, materialoj, instrumentoj.

Kun la inspiro de raciigantoj kaj inventantoj la studrondanoj en la kabineto de radioelektroniko kaj elektroaŭtomatiko faras funkciajn konstruadojn, el kiuj ne malmultaj trovas lokon en la naciaj ekspozicioj de la lerneja teknika kreado kaj

La studrondano Georgi Slavov finlaboras modelon de la historia ŝipo „Santa Maria“, per kiu Kolumbo tranavigis Atlantikan Oceanon kaj malkovris Amerikon.

ricevas registarajn kaj komsomolajn premiojn.

Multon oni povas skribi pri la malfacilaĵoj, problemoj kaj sukcesoj en la studado de la tekniko, en la preparo de lernejanaj scienc-teknikaj propagandaj fototabuloj, kelkminutaj mallargaj kinofilmoj, variaj laŭ enhavo kaj bone ilustritaj ĵurnaloj kaj aliaj presmaterialoj de la studrondanoj en la kabinetoj de la amaskomunikiloj: foto-grafio, kinotekniko, poligrafio.

— En la komenco ni opiniis, — diras la gvidantino de la studrondo „Juna redaktoro“ ĉe la kabineto de poligrafio Denka Jordanova, samtempe respondeca redaktoro de la bulteno de la Stacio „Problemoj de la lernejana teknika kreado“, — ke estas sufiĉe instrui praktike la studrondanojn propramane skribi la materialojn por sia ĵurnalo kaj propramane komposti, korekti kaj eĉ presi ilin. Tamen ni konvinkigis, ke la rezultoj estas ankoraŭ pli bonaj, kiam ni konigas al ili la teorion de tiu ĉi malsimpla afero. Ĉar la studrondoj „Juna redaktoro“ kaj „Juna poligrafo“ ĝis nun estas unikaj en nia lando, ni bezonas interŝanĝon de spertoj kun aliaj landoj, kie estas pli longa praktiko en tiu ĉi utila por la infanoj iniciato.

— Malgraŭ ke la kreo de niaj ĵurnaloj estas ege malfacila, precipe ilia verkado, ilustrado, modelado kaj poligrafado, ni estas feliĉaj, ke per ili ni povas esprimi niajn sentojn kaj pensojn, ankaŭ la interesojn, la ĝojojn kaj la revojn de nia infaneco, — diras Jolanta Koleva el la studrondo „Juna redaktoro“.

Kutime kiam oni mencias la kabinetojn de arkitekturo kaj konstruado kaj ankaŭ tiun ĉi de „dizajn“ (industria estetiko), ĉiuj studrondanoj en la Stacio parolas kun amo: „Tio estas niaj artoj! Ni ĝojas kaj fieras, ke ŝultro ĉe ŝultro kun ni laboras la junaj arkitektoj kaj „dizajnistoj“. Kaj vere, krom la specifajn taskojn, kiujn la studrondanoj en tiuj ĉi kabinetoj devas solvadi „laŭ la leĝoj de la beleco“, ili devas ankaŭ sekurigi „la estetikon“ de la tuta studrondana teknika aktiveco de la Stacio.

Grave influas ĉiujn koncize priskribitajn ĝis tie ĉi aktivecojn ankaŭ la laboro de la kabineto de fundamentaj sciencoj — matematiko, fiziko, kemio. En ili la junaj matematikistoj, fizikistoj kaj kemiistoj per sia senbrua, sed streĉa kaj krea laboro solvadas taskojn ne nur de siaj fakoj, sed ankaŭ „science“ sekurigas la tutan teknikan-estetikan agadon de la ceteraj studrondoj, konstante plialtigante ilian „teorian“ nive-

lon. Per sia scienca penso, per siaj kreaj fortostreĉoj ili donas sian modestan kontribuon por realigo de la granda devizo de nia tempo, nome la transformado de la scienco en produktadan forton.

Kiom multe da specifaj kaj pene solveblaj taskoj staras antaŭ la plej nova kabineto de la Stacio — „komenca teknika kreado“! Sed ĝia gvidantino Jordanka Koleva jam sukcesis kun la necesa profundigo „vidi“ tiun ĉi specifecon kaj „kapti“ la nedisigeblan unuecon de la labora-krea, teknika, estetika kaj scienca principoj de la multifaceta agado de la Stacio.

En la Stacio de la Junaj Teknikistoj estas kabinetoj, pri kiuj oni malmulton parolas, sed ilia laboro donis sentebajn rezultojn. Tio estas la metodika kabineto, la kabineto de pretigado de studrondaj gvidantoj por diversaj fakoj en la tuta lando, la kabineto de scienc-teknika propagando inter la lernantoj, la amasorganiza kabineto. La lasta subtenas aktivajn ligojn kaj kunordigas la fortostreĉojn de ĉiuj kabinetoj de la Stacio kun la distriktaj, urbodistriktaj kaj eĉ vilaĝaj stacioj de la junaj teknikistoj en la lando, kun la retoj de la kluboj por teknika kreado de la junularo en lernejoj, entreprenoj ka. Ĝia konstanta devigo estas ankaŭ la organizado kaj efektivigado de la publikaj inspektadoj de la teknika kaj scienca kreado de la lernantoj, kiuj pretiĝas per kvizoj, olimpikoj, konkursoj, konkuradoj, praktikadoj, ekspozicioj, konferencoj ktp. Nun la studrondoj pri diversaj scienc-teknikaj fakoj en la lernejoj kaj ekster ili estas ne centoj, sed miloj. Pli ol 50% de la lernantoj en **Bulgario okupigas entuziasme en la scienc-teknikaj studrondoj, en la kluboj por scienc-teknika kreado, en sciencaj ekspedicioj ka. Por ili en la Stacio laboras du kluboj — „Juna teknikisto“ kaj „Juna konstruktoro“ — kun multnombra membraro el la tuta lando.**

Dank' al la redakcio kaj la poligrafia bazo de la Stacio dum proksimume du jardekoj estis eldonitaj en grandega preskvanto centoj da titoloj, prezentantaj metodikajn gvidlibrojn kaj helpilojn pri diversaj fa-



Lernantoj, membroj de studrondoj „Juna redaktoro“ kaj „Juna poligrafo“ trarigargas la ĵus presitan numeron de sia ĵurnalo „Podem“.



koj, kiujn la propra magazeno sendas ŝarĝopage al la diversaj konstantaj kaj periodaj studformoj pri scienco kaj tekniko kaj ankaŭ al apartaj lernantoj en la lando por la tute nova studformo „Faru al vi mem!“.

Koncize dirite, en nia lando por la infanoj — de la infangardeno ĝis la lasta klaso de la lernejo — estas kreita ŝtata kaj samtempe amatora rondogvida kaj eldona eksterlerneja sistemo por laborkrea kaj estetik edukado de la juna generacio per uzado de temaro el la sfero de la scienco kaj tekniko. Anticipan informadon tiu ĉi sistemo ĉerpas el la direktivoj de la centraj komitatoj de la Komunista Partio kaj Komsomolo, el la dekretoj de la Registaro, el la instrukcioj de la Ministerio de Popola Klerigo kaj de la Respublika Centro por Scientechnika Kreado de la Junularo, ankaŭ el publikaĵoj de sciencesploraj institutoj, el scienceknikaĵ bulgarlingvaj kaj fremdlingvaj periodaĵoj kaj eldonaĵoj. Tiu ĉi informado estas eksperimentata de la rondogvidantoj en ilia krea laboro kun la lernantoj, kaj la plej sukcesa metodika sperto estas sintezata, publikata kaj aplikata en la tuta sistemo. Iuj el tiuj ĉi specialaj scioj, post ilia rezultodona eksperimentado, povas esti difinitaj kiel deviga minimumo por la lernantoj en la regulaj lernejaj programoj. La nura kriterio por transformado de tiuj ĉi specialaj scioj en „studobjektojn“ de la instruadega eksterlerneja sistemo estas, ke ili donu eblecon por atingi de la dezirata duobla pedagogia rezulto: ke la lernantoj povu ellabori belajn objektojn kun informada aŭ materiala funkcio kaj ke ili akiru

aldone novajn teoriajn sciojn kaj praktikajn spertojn en la kreaĵ laborprocesoj. Estas tute klare, ke la lernantoj, aliĝintaj libervole al tiu ĉi sistemo, povas okupiĝi pri ĉio, kio interesas ilin: pri scienco, pri tekniko kaj ĝia „nutraĵo“ — la energio, speciale pri teknika kreado (raciigado kaj inventado), pri aplikaj artoj, pri teknika sporto, pri lernado de fremdaj lingvoj, inkluzive de la internacia lingvo Esperanto. Por la bezonoj de la scienteknika tradukado povas esti organizataj studrondoj ekzemple pri fotografio, filatelo, modelismoj, matematikok. a. kun lernado kaj uzado de Esperanto aŭ de alia fremda lingvo, kiuj interŝanĝos siajn kreaĵojn kaj informojn pri siaj spertoj kun similaj studrondoj en aliaj landoj. Nerefutebla vero estas, ke fremda lingvo, kiel ĉiu speciala scio, estas plej bone eksposedata ne nur per la deviga lernado en lernejo, sed ankaŭ per samtempa lernado kaj aplikado en diversflanka praktika aktiveco.

La kreita en nia lando por la infanoj instruadega sistemo havas la taskon ne nur doni al ili kromlernolibrajn sciojn pri diversaj fakoj kaj fundamentajn specialajn sciojn, kiujn ili ne studas en lernejo, ne nur eduki ilin pri amo al laboro, kiu devas fariĝi ilia vivneceso, sed ankaŭ direkti ilin al lernejoj, kie ili povas fini la elektitan en la studrondo fakon kaj pretigi sin praktike por ŝatata profesio. Unuvorte, la ĉefa zorgo de tiu ĉi sistemo estas pretigi la infanojn tiel, ke ili povu, sendepende de la ŝanĝantaj cirkonstancoj, ĉiam trovi sian pozitivan rolon en la vivo kaj esti feliĉaj civitanoj de sia patrolando.

Verdaj steloj

Ljuba Bojaĝieva

LA MALGRANDA ESPERANTISTO

Vortojn multajn mi jam scias:

pano, rano,

ido, rido. . .

Kaj al panjo mi jam diras:

„Bonan tagon!“,

„Ĝis revido!“ . . .

Kiel paĉjo, ĉiam brave

mi lernadas

kun persisto

kaj insignon portas grave —

estas mi esperantisto!

Ljudmila Paspaleeva

MIAJ NEFORGESEBLAJ AMIKETOJ

Ne unufoje mi bedaŭras, ke mi ne estis esperantistino jam en mia infaneco. Tio ĉi okazas ĉiam, kiam mi renkontas infanojn-esperantistojn. Tiel mi ekpensis ankaŭ en la unuaj momentoj de mia vizito en la hungara urbo Gjula. Kondukante min al la hotelo la junpionirino Marika rakontis al mi, ke ŝi korespondas kun multe da infanoj el eksterlando.

— Tiel bele estas! — diris ŝi kun okuloj lumigitaj de gojo.

Kaj mi, la nova esperantistino, jam tiam ekkredis, ke Esperanto estas vera lingvo de amikeco.

Tiam mi ne konis la italan instru-



iston Nikola Lasalandra. Sed nun mi scias, ke en lia vilaĝo la bulgaraj infanoj havas amikojn. De sia instruisto la malgrandaj italoj lernis la Internacian Lingvon. Kiel li, ili amas ĉiujn popolojn, korespondas kun infanoj el diversaj landoj kaj kantas iliajn ŝatatajn kantojn. En la klaso de Nikola Lasalandra oni kantas esperantlingve ankaŭ la bulgaran kanton „Vento bruas, Balkan' ĝemas“ de Dobri Ĉintulov.

Bedaŭrinde, mi ne povis vidi ĉi infanojn en Varno pasintjare dum la Infana Kongreseto. Sed tien venis iliaj kamaradoj el Pollando kaj Hungario, el Ĉeĥoslovakio kaj Germana Demokratia Respubliko. Ili venis al nia Nigra Maro por interkonatiĝi, por ludi kune, por rakonti unu al la alia pri siaj okupoj kaj ŝatoj. En la korto kaj en la ĉambroj de lernejo „Jeĉka Karamfilova“ tutan tagon sonis Esperanto. La komuna lingvo amikigis la infanojn. Jam en la unua tago ili amike transdonis la pilkon unu al la alia, kuris gaje tra la korto, montris al si diversajn ludojn, kantis. Ĉiu rakonis pri sia lando, pri sia urbo, pri sia vilaĝo. La malgrandaj aktoroj de pola pupteatro kondukis siajn kamaradojn al alia maro, al sia urbo Sopot. Ili rakontis pri sia vizito en Londono laŭ invito de londonaj infanoj-esperantistoj. La polaj junpioniroj foliumis taglibron de la teatro kaj montris fotojn el la spektaklo „La paŝtisto kaj la kamenpurigisto“. Per tiu ĉi ŝatata fabelo de Andersen ili akiris ankaŭ en Varno multe da amikoj.

Mi rememoras la karnavalon de la malgrandaj kongresanoj. Ili ĉiuj gajis kaj dancis. Tie renkontiĝis polaj kaj hungaraj vilaĝanoj en naciaj kostumoj, herooj el la fabeloj de fratoj Grimm kaj Andersen, negro kaj pirato, pieroto kaj pajaco. Kaj, kompreneble, la ŝatata Ruĝa Ĉapeleto de Ŝarl Però. Inter la maskitoj mi rekonis la feliĉajn vizaĝojn de Sonjo, Anjo, Vanjo kaj Majo el Petriĉ, kiuj

prezentis la teatraĵeton „La kuraĉisto kaj la malsana lernanto“.

Tie mi konatiĝis kun du fratetoj — Aleŝ kaj Dalibor el Ĉeĥoslovakio. Unue mi ekparolis kun la pli aĝa.

— Aleŝ, kiam vi fariĝis esperantisto?

— Mi estas esperantisto de naskiĝo. Mia patro estas esperantisto kaj faris tia ankaŭ min.

— En kiu klaso vi estas?

— En la kvara.

— Ĉu plaĉas al vi la infana kongreseto?

— La infana kongreseto plaĉas al mi.

— Ĉu vi estas kontenta, ke vi scias Esperanton?

— Jes, mi estas feliĉa, ĉar per Esperanto mi povas koni infanojn el la tuta mondo.

La frateto de Aleŝ, Dalibor, ankaŭ estas denaska esperantisto kaj tute libere parolas Esperanton.

— Dali, en kiu klaso vi estas?

— Nun mi estas en la dua.

— Kio plej multe plaĉas al vi en la programo de la infana kongreseto?

— La pola pupteatro.

Esperanto alportis grandan ĝojon ankaŭ al Saŝko Zahaĝiev el Sofio. Mi eksentis tion jam ĉe nia unua interparolado.

— Saŝko, ĉu vi amikiĝis kun iuj infanoj dum la infana kongreseto?

— Jes, mi amikiĝis kun du malgrandaj poloj — Roberto kaj David, kun du slovakoj Aleŝ kaj Dalibor, ankaŭ kun la pioniroj Vaĉek, Vojtek kaj multaj aliaj. Foje, revenante de la granda kongreso, mi amikiĝis kun s-ano Hristofor Fetes el Irlando. Li gvidis la grupon de la grandaj infanoj. Hristofor Fetes estas bona amiko de la infanoj, li ĉiam ludis kun ni, estis tre afabla kaj gaja.

— Ĉu nun vi korespondos kun viaj amikoj?

— Mi korespondos kun ĉiuj.

Ho, bela lingvo Esperanto, kiel vi ligas kaj amikigas la purajn korojn de la infanoj el la tuta mondo!

deziras korespondi

GDR

Novaj e-istoj (15—18-jaraj) — kun ĉi pri ĉt, pm, bk. Komuna adreso: Andreas Bruckner — Siedlung 3, 8313 Dohna.

Kurt Wiberlin — Seelenbinder Str. 67, 117 — Berlin (50-jara — kun bulgaroj).

Frank Schlieckau — Krs. Salzwedel, 3561 Hermingen 50A (pri astronomia fiziko kaj ĝenerale kun studentoj).

S-ino Horn — Allende Str. 4/47, 20 Neubrandenburg (en la somero de 1979 veturos al Sovetunio per propra aŭtomobilo kaj dezirus havi kontaktojn kun e-istoj el Kiev, Rostov, Orĝonikidze, Pjatigorsk, Tbilisi, Erevan).

Pollando

Kristina Kryniewiecka — Opolska 7 K7 PL 80-395, Gdansk Oliwa (50 j. ekonomistino).

Margareta Lewandowska — ul. Gdanska 11 A 10, PL 80-518, Gdansk Brzezno (39 j. oficistino).

Cecilia Radzanowska — ul. 22 Lipca 19, Dom Rybaka Fizioterapii, PL 84-120 Wladislawowo, woj. Gdanskie (38 j. flegistino).

Danuta Kwiatek — ul. Wolnosci 2840, 41-800 Zabrze (49 j. instruistino — historio, geografio, turismo).

Andrzej Taudul — ul. 3 Maja 49, 84-230 Rumia (18 j. — muziko, sporto, lingvoj, pm, bk).

E-istoj 18—27-jaraj — kun ĉi pri turismo, sporto, fotoj, geografio, Komuna adreso: Jozef Roman Maksymiuk — ul. Kopernika 6/40, 23-200 Krasnik.

Novaj e-istoj 19—45-jaraj — kun ĉi. Komuna adreso: Maria Balaban (sekretariino de Esperanto-Rondo) — 73-110 Stargard Szs-2, skrytka pocztowa — 148.

20 gelernantoj, membroj de E-klubo — tutmonde. Komuna adreso: Esperanto-klubo ul. Sienkiewicza 5, 1605 Michalowo, Licejo.

Klubanoj — tutmonde pri ĉt. Komuna adreso: Esperanto-Rondo, Kulturdomo, str. Wojska Polskiego 13, 87-800 Wroclawek.

Studenta E-rondo ĉe Medicina Akademio — kun similaj rondoj en la tuta mondo pri sciencaj problemoj, turismo, reciproka gastado ktp. Adreso: Studenta Esperanto-Rondo, RU Szsp Vroclavo, ul. Sklodowskiej Curie 65.

Andrzej Kosinski — ul. Sieniawska 17/13, 68-200 Zary (28 j., radioteknikisto).

Stefania Mazurek — ul. Polna 4/22, 05-200 Wolomin (21 j. flegistino — bk, libroj, muziko, junularaj problemoj).

Georgo Szablinski — ul. Emilii Platev 17/15, 78-400 Szczecinek (20 — muziko, sporto, geografio).

Sovetunio

Novaj e-istoj (21 gelernantoj 11—17-jaraj kaj civitanoj 20—40-jaraj) — tutmonde. Komuna adreso: Ants Mikk — str. Rauge 30—35, Viljandi, SU 202900.

13—14-jaraj knabinoj — tutmonde kun samaĝuloj. Skribu al: Esperanto-Rondeto — Sr. Skola № 4, Surgut — 1, Tjumenskaja obl., 626400 USSR.

Novaj e-istoj (20 geknaboj, 16—19-jaraj) — tutmonde. Komuna adreso: Esperanto-kursoj (T. Lukosevicius), Hidromelioracia Teknikumo, Panevezys, Litovio.

12 lernantoj (12-jaraj) — kun samaĝuloj — tutmonde (pm, bk, muziko). Skribu al: Muĥumov Murat, Beregovaja 80 — Talgar 483310, Kazahskaja SSR.

10 sovetaj studentoj — kun studentoj tutmonde pri ĉt. Komuna adreso: Panova Olja, poŝtkesto 684, 665806 Angarsk.

13—14-jaraj e-istoj — tutmonde. Adreso: Esperanto-Rondo (K. Lukosevicius), Utenos raj., 234900 Saldutiskis, Litovio.

Novaj gee-istoj loĝantaj en Kamĉatka — tutmonde pri ĉiuj temoj. Jen la apartaj adresoj:

Olga Ŝumilova — str. Opolĉencev 13, kv. 1, Petropavlovsk — Kamĉatskij, 683032 USSR, (16-jara — pm, bk, kalendaretoj).

Alla Dubina — str. Vojeŝeka 7, kv. 42, Petropavlovsk — Kamĉatskij, 683024 USSR (16-jara — kalendaretoj, fotoj de aktoroj).

Lena Mojsejeva — str. Leningradskaja 65/1, kv. 80, Petropavlovsk — Kamĉatskij (16-jara — kalendaretoj, fotoj de aktoroj).

Sergej Paravin — str. Vladivostokskaja 47/3, kv. 17, Petropavlovsk — Kamĉatskij, 683011 USSR (17-jara — fotografado kaj libroj pri ĝi, bk pri urbopejzaĝoj).

Sergej Pavluĉenko — str. Lenina 26/80, Jelizovo, Kamĉatka, 684010 USSR (18-jara — sporto, muziko, filmoarto, insignoj).

Ilmar Palias — Liiva 15, 200016 Talinn, Estonio (serioza filatelisto — interŝango kun la tuta mondo).

Avo Suurmets — 202615 Värskä, Estonio (instruisto — pri instruado, edukado, E-o).

Lernantoj 13 — 14-jaraj — kun tuta mondo pri ĉt. Komuna adreso: Tallinna 10 Kesk kool, Raudtee 73, Esperanto-klasoj, 200001-Talinn, Estonio.

Jura Petroŝeviĉ — ul. Gagarina, pr. 3, 703 003 Samarkand, Uzbekio (28-jara fraŭlo — kun ĉi pri ĉt).